

Pri *drapo* kaj aliaj vortoj

Leandro Abrahão

En la libro *La Bona Lingvo* Claude Piron asertas, ke vortara difino de iu vorto estas apenaŭ efika por ebligi al leganto bildigi al si ties konceptojn. Vortoj estas kompreneblaj ene de kunteksto. Jes. Tamen multaj Esperantaj vortoj verŝajne havas nur vortaran ekziston, kaj balaste vegetas en la kapo de iuj esperantistoj, kiuj konservas kadavran, neniam praktike uzitan vortprovizon. La vorto *drapo* estas unu el tiuj, kiujn, malgraŭ la uzekzemploj de Zamenhof mem (kaj ankaŭ la vortaraj difinoj), mi neniam uzis, cetere ĉar ĝis nun mi neniel trovis kion nomi per ĝi. Same kiel homa korpo agadas por elpuŝi spliteton, kiu enstrudiĝis sub la haŭton, tiel venis por mi la tempo traekzameni la vortprovizon, kiu splitiĝis en mi. Mi ŝatus ĝin analizi por ekscii, ĉu ankoraŭ eblas deteni la inflameton, kiu estas jam antaŭvidebla, kaj kiu iam neeviteble fagocitos ĝin.

Iom pri *drapo*.

Serĉo en la *Esperanta Tekstaro* trafis en la Zamenhofa verkaro dek sep uzekzemplojn de tiu Fundamenta vorto. Jes, ĝi estas pli ol jarcenta. En la *Fundamento de Esperanto* ĝi aperas kvarfoje: *alportu al mi metron da nigra drapo* (*metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo*). Ĝi servis trifoje nur por gramatika klarigo pri la vorteto *da*.

Jen aliaj ekzemploj el *La Revizoro*: *li donis al vi por uniformo du arŝinojn da drapo; kaj la drapo estas tiel grava, angla!*

Kaj el *Marta*: *granda tablo, kovrita per verda drapo; grandaj pecoj da drapo, toloj, batistoj, muslinoj*.

Ankoraŭ estas tri ekzemploj el la *Fabeloj de Andersen* (v.2). Tamen ne necesas citi ilin, ĉar kion mi komprenas el la antaŭaj ekzemploj, tion saman mi komprenas el la ekzemploj trovitaj en la *Fabeloj*: la vorto *drapo* estas speco de ŝtofo. Jes, ŝtofo. Kia malsurpriza konstato!

Laŭ la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (PIV) la vorto *ŝtofo* signifas teksaĵon, kaj *teksa* signifas:

dense interkrucigi la fadenojn de vefto kaj de varpo, por elfari ŝtofon. Nu, tion mi povas tuj bildigi al mi. Eĉ se mi ne konus la signifojn de la vortoj *vefto* kaj *varpo* eblus supozi, ke temas pri ŝtofspecoj. Kaj kio pri *drapo*? Laŭ PIV *drapo* estas *lana fulita teksaĵo, uzata por vestoj, tegoj* ks. Por kompreni ĝin necesas scii, kio estas *lano* kaj kio estas *fuli*.

Eĉ konante la signifojn — kiujn mi sekve tuŝos — ĉu mi kapablus distingi ian lanan fulitan teksaĵon inter alispecaj teksaĵoj por iam povi finfine uzi la vorton *drapo*? Ankoraŭfoje laŭ PIV: *lano* estas *speco de haroj [...] formanta la felon de ŝafoj k.a.*, kaj *fuli* signifas *lavi kaj poste premegi lanan teksaĵon inter cilindroj de tiucela maŝino, por fari ĝin pli densa k fortika*. Eblas do konkludi, ke *drapo* estas prilaborita lano de i.a. ŝafoj.

En la Zamenhofa verkaro la vorto *fuli* aperas kvarfoje, en la Malnova Testamento, en kiu oni legas pri fulistoj. Estas tre probable, ke antaŭ miloj da jaroj — t.e. en la tempo, kiam okazas la historioj rakontataj en tiu parto de la Biblio — ne ekzistis cilindroj nek maŝinoj por plidensigi kaj plifortikigi lanan felon. La Malnova Testamento mencias krome fulistojn kaj vojojn de fulistoj, do tiam nepre ekzistis personoj, kiuj okupiĝis pri fulado ene de fulejoj, sed supozeble ne uzante cilindrojn kaj maŝinojn tiajn, kiajn la homoj fabrikas nuntempe.

Estas interese konstati, ke *fuli* ne estas oficiala vorto. Mi lernis, ke la Akademio oficialigas vortojn, kiuj estas jam elprovitaj, kaj kiuj fariĝis ĝenerale uzataj de la esperantistoj. Eble ne tiu estas la stato de la vorto *fuli*. Mi diru tuj, ke mi ne diskutas pri la praveco de la oficialigoj, pri kio mi scias, ke oni multe diskutas.

Se ne estus la fultekniko, *drapo* povus fariĝi kunmetita vorto, t.e. *lanteksaĵo*. Sed fulado estas nepre konsiderenda. Drapo estas fulita lanteksaĵo. Nu, ne eblas rezigni pri la vorto *drapo*. Verŝajne ĝi ne estos fagocitita de miaj savĉeloj. Tamen, por uzi ĝin mi devus aŭ demandi, ĉu oni estas vestita per tia speciala lanaĵo — pri kio eble oni ne povos

respondi — aŭ iam spertiĝi pri ŝtofoj, por elvolvi la kapablon distigi ilin ĉu per tuŝo, ĉu per ek-rigardo. En tiu senco, drapo estas ja nemalhavebla,

danke al fulado. Jes, de nun ĝi havas pluan vivon en mi, kvankam mi devas daŭre rezignacii pri ĝia neuzado. Ĝi restos seninflama sendolora spliteto.

Komentarioj

Tiu ĉi artikolo prezentas al mi allogan pretekston por esplori la estiĝon de unu vorto en Esperanto. La vortaro de la tiel nomata *Unua Libro* (1887) kaj la unua eldono (1894) de la Universala Vortaro, ambaŭ kompilitaj de Zamenhof, ankoraŭ ne enhavis la radikon *drap-*, kiu poste aperis en lia *Vortaro Rusa-Esperanta* (1896), en lia *Meza Vortaro Internacia-Germana* (1898) kaj en la dua eldono (1898) de la *Universala Vortaro*. Jen ĝiaj tradukoj en la Franca, Angla, Germana, Rusa kaj Pola lingvoj, respektive, troveblaj en la ĉi-lastata verko:

4 **drap'** drap | woollen goods | Tuch (wollenes Gewebe) | cykno | sukno.

Precize la samaj tradukoj aperas en la *Fundamento de Esperanto* (1905). Sed evidente ili per si mem ne precize difinas la signifon de *drap-*, kaj aldone oni devas, kiel ĉiam, scipovi almenaŭ unu el tiuj lingvoj por kompreni tiun signifon — kaj eble oni malsukcesos eĉ scipovante ĉiujn!

La Franca *drap*, el kiu deriviĝis la Esperanta radiko, signifas, laŭ la *Larousse-Vortaro*: 1. *Rezistema ŝtofo, el pura aŭ miksita lano, kiu suferis fuladon, ofte sekvitan de skrapado, kio faras la supraĵon lanugeca kaj liveras al la ŝtofo altan kapablon ŝirmi kontraŭ malvarmo*. 2. *Tolaĵo el lino, kotono, kanabo ktp., fasonita kaj borderita je diversaj dimensioj, per kiu oni kovras liton por izoli la korpon de la matraco (suba drapo) aŭ de la kovrilo (supra drapo)*. 3. *En Belgujo, buŝtuko*.

La Angla traduko estas tre nepreciza kaj maltaŭga: *lanvaroj*. Iom pli preciza estas la Germana traduko: *ŝtofo / tolo / tuko (lanteksaĵo)*. La Rusa *cykno* signifas: (*fulita*) *lanŝtofo*. La Pola *sukno* signifas: *lanŝtofo*. (Efektive la Angla traduko devus esti: *woolen broadcloth*, kies signifo egalas la unuan Franclingvan difinon. Sed estas konata fakto, ke ofte la Anglalingvaj tradukoj en la Fundamento estas nebonaj, ĉar Zamenhof ne sufiĉe regis ĉi tiun

lingvon kaj dependis de la kunlaboro de aliuloj.) Ankaŭ menciindas, ke la postaj *Akademias Korektoj* al la tradukoj de la Universala Vortaro (1922–1923) ne modifis la tradukojn de *drap-*.

Ordinare pli utilis uzi Esperantlingvan difinon anstataŭ tradukon. Ĝia unua versio aperis en la vortaro de Kabe (1910), la prapatro, se tiel diri, de ĉiuj postaj PIV-oj. Jen la difinoj:

Kabe (1910)

Drapo. Ŝtofo, fabrikata¹ el lano kaj uzata por vestoj. *Drapa*. El drapo: *drapa kurteno*.

Plena Vortaro (1934):

***Drapo.** Teksaĵo el lano, uzata por vestoj: *Kia ~o, tia vesto^Z*.

Plena Ilustrita Vortaro (1970):

***Drapo.** Teksaĵo el lano uzata por vestoj: *kia ~o, tia vesto^Z; alportu al mi metron da nigra ~o^Z*. → ŝtofo, tuko, lanaĵo.

Reta Vortaro (ReVo):

***Drapo.** Teksaĵo el lano uzata por vestoj: *kia drapo, tia vesto^Z*.

Nova PIV (2005):

***Drap/o.** Lana fulita teksaĵo, uzata por vestoj, tegoj ks: *kia drapo, tia vesto^Z; alportu al mi metron da nigra drapo^Z*. → ŝtofo, tuko, lanaĵo.

Efektive, jam la traduko de *La revizoro*, verkita de Zamenhof ĉirkaŭ 1907, uzis tiun radikon kvinfoje. Sed kial li ne kontentiĝis per *lanteksaĵo* aŭ *lanŝtofo*? Ni rajtas supozi, ke li celis specifan materialon, ne precize esprimeblan per ĉi tiuj vortoj.

Ni ankaŭ rajtas supozi, ke la aŭtoro de la koncerna artikolo en la *Nova PIV* prave ne kontentiĝis per la antaŭaj difinoj, kiuj efektive estas tro neprecizaj. Ĉar ja temas pri ŝtofo kun apartaj proprecoj, kiel klarigas la artikolo de Vikipedio pri *broadcloth*:

Densa, simple teksita ŝtofo, antaŭe lana. Nuntempe, ĝi plejparte konsistas el kotono aŭ el kotonmiksaĵo. Ĝia distingaĵo ne la fina larĝo, sed la fakto, ke ĝi estas teksita multe pli maldense (tipe je larĝo 50–75% pli granda ol la fina) kaj poste intense martelita [...] por redukti ĝin al la fina larĝo. La rezulto de la martelado estas kunŝovi la fadenojn multe pli proksimen ol atingeblus per teksomaŝino kaj lasi, ke la individuaj lanfibroj kunligiĝu per procezo de feltigo. El tio rezultas densa ŝtofo, tre veter- kaj uzrezista, kiu subtenas tonditan randon sen bezoni orlon.



DRAPA ROBO (MALDEKSTRE) – 1905

Kial la radiko *drap-* estas tre malfacile renkontebla en Esperantlingvaj tekstoj? Laŭ la sama Vikipedia artikolo, drapon oni komencis produkti en Flandrujo dum la 11-a jarcento kaj dum la tuta Mez-Epoka periodo. Ekde 1500 la Flandra produktado devis alfronti la konkurencon de aliaj landoj, ĉefe de Anglujo. La Angla produktado de drapo kulminis dum la mezo de la 16-a jarcento. Dum la 17-a jarcento ĝi malaltiĝis kaj fine perdis sian iaman gravecon ekde la 18-a jarcento. Nuntempe drapo, pro sia felteca, velureca supraĵo, estas populara materialo por tegi meblojn kaj internojn de luksaj aŭtomobiloj.

Konklude, la malfacileco de nia amiko Leandro bildigi al si la konkretan signifon de *drapo* originas el ĝiaj antaŭe tro malprecizaj difinoj — situacio, kiu korektiĝis sole nur ekde la publikiĝo de la *Nova PIV*.

Temas do pri tre specifa vorto koncernanta materialon, kies uzado por vestoj eksdatiĝis, dum ĝiaj uzoj modernaj estas limigitaj. Sed la eksdatiĝo kaj nuntempa malpopulareco de *drap-* tute ne estas unikaj fenomenoj okazintaj al la radikoj de la *Fundamento*. Ni pensu pri aliaj ekzemploj, kiel *kaleŝ-*, *livre-*, *ken-* kaj similaj. Lingvoj estas dinamikaj estaĵoj: vortoj aperas, kelkaj populariĝas kaj enradikiĝas, aliaj forgesiĝas.

Ĝustatempe: ĉu vi leganto scias la signifon de *keno*? Ĉu vi iam konatiĝis al ĉi tiu vorto? Sed jen alia historio...

Francisco S. Wechsler

NOTO:

¹Moderne preferindus *fabrikita*.



[...] La kontraŭstarigo de “artefarita” aŭ “helpa” al “natura” aŭ “vivanta” estas malutila el ĉiuj vidpunktoj. Tia nomado kreas eraran impreson, ke Esperanto tute ne povas funkcii kiel lingvo aŭ, en la plej bona kazo, ke ĝi estas nur ia surogato de lingvo, per kiu oni ne povas esprimi la nuancojn kaj subtilaĵojn de la penso. Superflue diri, ke tia antaŭjuĝo, al kiu la eraroj en nia informado abunde kontribuis en la pasinteco kaj bedaŭrinde ankoraŭ kontribuas, grave obstaklas la normalan disvastiĝon de la lingvo en la larĝaj popoltavoloj. Krome, per tio ni mem liveras municion por la kanonoj de la konsciaj malamikoj de Esperanto. [...]

Ivo Lapenna